2-a Jaro, N-o 17 (69)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

21. Januaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)	Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

EL KORO DE AZIO

(Mongolio kaj Burjatio)

Ekstera Mongolio kun apuda Burjatio lokiĝas inter Ĉinio kaj Sovetio ĝuste en geografia mezo de Azio. Mongolio areas ĉirkaŭ 1½ milionojn da kv. kilometroj, sed havas nur 700 000 loĝantojn, kies kvanto restas senŝanĝa jam dum multaj jarcentoj pro plua manko da paŝtejoj. La manko haltigis pluajn progresojn de mongoloj.[1]) Tial ili komencas ŝanĝi sian paŝtistokupon, kiu ne povas kontentigi pluan loĝantaron. Ili komencas terkulturi kaj atente rigardas la ekzemplon de industrio en najbara *Sibirio*[2]) por imiti ĝin. Vole nevole Mongolio eliras komunehoman vojon de industriiĝo.

Kaj responde ŝanĝiĝas emoj, moroj kaj ideologio aŭ mondkompreno de mongoloj.

Antaŭ nelonge Mongolio estis absoluta teokrata monarkio tute simila al tiu de mezepoka Eŭropo kun tiamaj papoj — monarkoj. Religio plene posedis cerbon kaj volon de mongolo. Ĉirkaŭ duono da tuta viraro estis "dediĉita al dio" t. e. monaĥigita.



Tipa mongolo-burjata familio ĉe sia portebla feltodomo.

Sed post morto de lasta monarko somere de kuranta jaro mongoloj jam estas certaj, ke "surtera dio" ne reenkorpiĝos plu. Mongolio fariĝis respubliko. Influo de eklezio estas ege limigita. Mongoloj kreis tre potencan popolan partion, kiu estras politikan kaj spiritan vivon de la lando. La partio havas radikalan programon, kiu penas imiti tiun de rusa kompartio. Ĝustadire la partio nur konkordigas siajn agojn kun rusa kompartio en la grado, kiun permesas preskaŭ senindustria vivo de mongoloj. Mongolio utiligas politikan kaj ekonomian sperton de pli aĝaj najbaroj. Aperas jam proletaro. Ĉefurbo de Mongolio Ulan-Bator-Ĥoto jam havas profunuiĝon de laboristoj kaj oficistoj (ĉirkaŭ 600 homoj). En mezo de novembro okazis tutmongolia kongreso de Junulunio kaj en oktobro konferenco de virinoj senpartiaj. La kongreson ĉeestis 109 delegitoj, plejparte *ojratoj* — mongoloj el okcidentaj provincoj, kie manko da paŝtejoj sentiĝas plej akre. La kongreso salutis Internacian Junulkomunion kaj laboros 10 tagojn laŭ la ordo: 1. La internacia kaj interna situacio de Mongolio, 2. internacia junulmovado, 3. raporto de Centra Komitato, 4. raportoj de branĉoj de Unio, 5. Organizaj aferoj, 6. politikkleriga laboro, 7. soci-politika laboro, 8. pionir-movado kaj 9. elektoj.

La konferencon de virinoj ĉeestis 140 delegitinoj. La konferenco salutas *Kominternon* certigante, ke virinoj de Mon-

[1]) Nuna privata sistemo de produktado same haltigas pluan progreson de Francio.

[2]) Oni tute senbezone kripligas la nomon de la lando skribante *Siberio* anstataŭ *Sibirio*. Oni malsprite francigas ĝin. En origina lingvo oni diras *Sibirj*, sed ne *Siberj*.

golio gvidataj de Komintern nepre sukcesos eliri sur luman vojon de Socialismo.

Najbara *Burjatio* (ĉirkaŭ Bajkal-lago) havas nur 500000 loĝantojn, el kiuj duono estas rusoj. Profunioj de Burjatio ekzistas nur du jarojn, sed bone progresas. En pasinta jaro ili havis 11000 anojn, en la nuna 14000 anojn. Meza salajro de laboristo en 1924 estis inter 32$^1/_2$ kaj 40$^1/_2$ rubloj. En nuna jaro ĝi estas inter 30$^1/_2$ kaj 45$^1/_2$ rubloj. Bedaŭrinde en tuta Burjatio estas ĉirkaŭ 1200 senlaboruloj. 700 el ili en ĉefurbo de Burjatio *Verĥne-Udinsk.* Tamen ilia nombro rimarkeble malgrandiĝas.

Mongolio, Burjatio kaj irkutska gubernio estas ligitaj per ŝipireblaj riveroj *Selenga'*, kiu fluas en lagon Bajkal, kaj *Angara'*, kiu fluas el Bajkal en riveregon *Enesej'*. Preskaŭ tuta varŝanĝo inter tri nomitaj regionoj okazas per ĉi riveroj. En nuna jaro estis kreita speciala ŝtata ŝiparo de Selenga (10 vaporŝipoj kaj 20 barkoj), kiu funkcias sendeficite. Sole el ĉefurbo de Mongolio estis transportitaj ĉirkaŭ 10000000 kilogr. da feloj kaj lanoj. Ensume dum nuna jaro per Selenga, Bajkal kaj Angara' estis transportitaj ĉirkaŭ 29000000 kilogr. da varoj kaj 15000 homoj. Plej gravaj centroj de Mongolio *Kobdo, Ulasutaj'* kaj *Krasnij* estas telegrafe ligitaj kun sia ĉefurbo. Tra timiga dezerto *Gobi* nun tute regule cirkulas ĉirkaŭ 200 aŭtomobiloj kaj super ĝi ekflugis aeroplanoj. En ĉefurbo de Migrulio nun ekzistas publikaj manĝejoj, kie oni povas tagmanĝi por 50 kop. same kiel en Irkutsk, Moskvo aŭ Parizo.

Tutmonda proletaro, vi vidas, ke eĉ la plej malprogresintaj mongoloj, per kiuj timigas vin viaj burĝuloj, eliris sur vojon de komunhoma kulturo. La fakto tute garantias vin kontraŭ ĉingizĥanismo de "barbaroj". Kuraĝu, mondanoj, ĉar platigata estas via vojo al Novo! *M. Krjukov.*

Soldata vivo en Ĉekoslovakio

La militoficejoj en Ĉekosl. Resp. eldonis statistikon pri sanecaj cirkonstancoj de la soldatoj. La plej interesaj estas ciferoj pri memmortigoj, kiuj vidigas, ke la plej multe da soldataj mortoj kaŭzas memmortigoj.

En la jaroj 1921—22 mortis 628 soldatoj, el tio 101 (16 %) pro memmortigo: 1922—23 mortis 466 soldatoj, el tio 110 (23 %) pro memmortigo; 1923—24 mortis 399 soldatoj, el tio 96 (24 %) pro memmortigo. Preskaŭ unu kvarono faras memmortigojn kaj ties procentoj konstante kreskas. La militoficejoj eldonis statistikajn ciferojn sed multe pli interesus, se ili publikigus la kaŭzojn de la memmortigoj.

Laŭ la gazetaj raportoj plej ofte kaŭzas memmortigojn ĉikanado, flanke de estroj kaj malbona traktado al la soldatoj.

El kom. gazetoj "Pravda", Plzen, Ĉekosl. *5194.*

La salajrbatalo de l' instruistoj en 1925

La jus finiĝinta jaro estas por la tuteŭropa instruistaro sufiĉe riĉa per bataloj kontraŭ la ŝtata senzorgemo rilate al la ekonomia situacio de la instruista laboristo.

Kiu do asertos, ke mastro ŝtato estas plej bona dunganto kaj ke la instruistoj ne havas saman socian kondiĉon, kiel la aliaj laboristoj ekspluatataj de kapitalo?

La salajrbatalo furiozis en Belgio, Francio, Anglio, Polio, Svedio ktp. . . . kaj bedaŭrinde nur en unu lando, Belgio, instruistoj sukcesis atingi siajn postulojn.

Plian fojon ni konstatas, ke nur forta protesto kaj batalema organizo de l' instruistaro laŭ modelo de la laboristaj sindikatoj sukcesas atentigi la ŝtaton pri la mizera situacio de la "kolumproletarioj", kiaj ni estas. La belgaj gekolegoj dankas la sukceson al la agitado de la "Centralo de la instruistaro socialista". Ili sukcesis voĉdonigi salajron bazitan sur la antaŭmilita valoro (sama ekonomia valoro, kiel antaŭmilite) kun tiel nomita "movebla skalo" (varia aldono) varianta laŭ la gradeco de la ekonomia indekso.

En Anglio, tiu lando, kie voĉdonas la virinoj, sed kie la instruistinoj ricevas sa lajron nur $^2/_3$ valoranta tiun de la instruistoj la registaro reduktis per 5% la instruistinan salajron. Tion ĝi povis fari pro la nebatalemo de la instruista amaso kaj pro la krima sinteno de la direktorara asocio favorinta la malpliigon. Kiam do okazos la internacia kontaktiĝo de la instruistinaj grupoj por informiĝi pri la netolerebla situacio de salajra malplieco ĉe kelklandaj instruistinaroj: Anglio, Svedio, Svisio, Holando . . . Se laboro egalas, tiam egalu salajro.

En Polio la reakcia registaro ĵus malpliigis la instruistan salajron per 5% kaj eksigis 20000 ŝtatoficistojn. Kompreneble, pro la politika situacio, la instruistoj ne povas efike protesti, sed bolas ilia kolero. Ĉu malprave ili sin turnas al laboristaj organizaĵoj kaj al ideoj de la proletariaj amasoj, ĉar ili finkonstatas, ke brava partopreno en la socia lukto povas plibonigi ilian situacion.

En Francio, la instruistoj estas tre malkontentaj. La Bloko de la Maldekstruloj estis antaŭ 20 monatoj promesinta, ke ĝi altigos la mizeran salajron de la ŝtatoficistoj. Ili tion promesis por ekposedi la regadon. Dank' al grava helpo de la "Ŝtatoficistara Federacio", kiu kunigas ŝtatoficistajn sindikatojn el ĉiuj fakoj, la Maldekstra Bloko (radikalistoj kaj socialistoj) triumfis en la parlamentaj balotoj kaj sukcesis ekregi. Sed ĝis nun la ŝtatoficistoj estas primokataj. Oni voĉdonis malmultegan aldonon kaj nur parton donis en 1925; kaj dume la vivkosto altiĝas duoble pli rapide ol malaltiĝas la franka valoro.

La instruistara amaso grupigita en la Nacia Sindikato, de kelkaj monatoj aliĝis al la konfederacio ĝenerala de la laboro (apartenanta al Amsterdama Internacio). Ĝi konsistas el pli ol 70000 anoj. Ĝi estas tiel malkontenta, ke oni preparas agitadon kaj proteston kaj eĉ strikon kontraŭ tiu sama registaro, kiun la ŝtatoficistara federacio helpis dum la balotoj de 1924.

La granda kulpo de la Nacia Sindikato kaj de la tuta Ŝtatoficistara Federacio estas, ke stulte ili fidis al burĝa bloko kun moderna maldekstra formo kaj ĉesigis la agitadon kredante, ke la salajraltigon ili tuj ricevos. Pro ilia naiveco ili malsukcesigis la bone preparitan agadon de 1924 per mitingoj kaj strataj manifestoj. La strutoj sin ĵetas en dens-arbaĵon por ne vidi la ĉasiston.

Estas vere, ke salajraltigon akiros instruistaro nur se ĝi uzos verbataleman sindikalistan metodon, nur se ĝi eltiras perforte tiun salajraltigon de la burĝa registaro. La kapitalistaj ŝtatoj estas en la nuna postmilita epoko tro bone armitaj administracie kaj organize kaj estas nun senvaloraj la malnovaj metodoj pri timemaj postuloj (pliĝuste: petoj) de la instruistaro. Oni ne bleku, kiel ŝafoj, sed oni montru dentojn kaj mordu!

En la plejmultaj eŭropaj landoj la instrulaboristaro fine vekiĝas, fine konstatante, ke ili apartenas socie kaj kore al proletariaro.

Kiam la ĉeka registaro aŭdacis redukti per 25% la salajron de sia instruistaro, la ĉeka kolegaro kolere protestis kaj dissendis en la tuta mondo civiliza alvokon pri tiu kruela ago de registaro sin asertanta kultura.

Sed tiuj nur vortaj protestoj atingas nenion; kaj la eŭropa instruistaro de la milito uzas de tempo al tempo la malkaŝe klasbatalan taktikon per mitingoj kaj striko.

En Anglio, Portugalio, Rumanio, Belgio, Italio ktp. . . ., la instruistoj uzis plensukcese strikon daŭrintan de unu horo ĝis kvar monatoj.

Jen la rimedoj, kiujn la francaj instruistoj uzas por agiti pri salajraltigo aŭ pri amnestio kaj reoficigo de suspenditaj kamaradoj, kun helpo de la aliaj ŝtatoficistoj.

1. Organizo de kartelo kun la aliaj ŝtatoficistoj por komunaj postuloj. La kartelo estas provizata de riĉa kaso, kaj eldonas afiŝojn, organizas mitingojn, ktp. . . .

2. Organizo de agitado per gazetaro progresema. La celo estas akiri favoron de la publika opinio sen kies helpo ĉia agito estas vana. Ĉefe helpas la laboristaj gazetoj.

3. La afiŝoj kaj alvokoj al publiko ne estas iaj "ĝentilaj" petoj, sed senkompataj atakoj kontraŭ registaro, kiu elspezas la publikan monon favore al nur unu klaso socia: la burĝa. La publikinstrua buĝeto estas komparata al tiuj de la armeoj, de la kolonioj, de la Eklezioj, ktp. . . . Se la financa situacio de la ŝtato estas kriza, eĉ bankrota, ne estas la kulpo de la instruistoj; riĉuloj vivas en hontinda lukso kaj ĉiam estas favorataj en la impostoj.

4. Mitingoj estas revoluciemaj. La parlamentanoj estas invitataj ĉeesti kaj sin defendi. Ili neniam ĉeestas kaj sendas sensignifan letereton aŭ nenion; sed ili estas akre kritikataj. Mitingo en tiel nomata "fermita vazo„ t. e., interna de salonego trafas nenion tial la instruistoj fine de la kunvenoj amase manifestas sur la stratoj, kiel laboristoj en la unua de majo. La riĉaj burĝoj ĉe siaj fenestroj rigardas koleran popolon kaj timas.

Antaŭ du jaroj, kiam la tuta ŝtatoficistaro postulis altigon de 1800 frankoj jare, en mia urbeto preskaŭ 2000 ŝtatoficistoj kriegis sur la strato: 1800! 1800! piedfrapante kaj eĉ multaj kantis la internacion. En Parizo, okazis grandiozaj manifestoj.

Ĝis nun en Francio ne okazis striko, sed tre kredeble ĝi okazos en 1926, se la registaro ne konsentos en ilia tuteco la promesojn pri salajraltigo.

Tre naiva estas en la nuna epoko la instruisto, kiu ankoraŭ imagas, ke li ne apartenas al la proletaria klaso kaj ke sen lukto li akiros salajran plialtigon de kapitalista ŝtato. Malfeliĉa instru-laboristo, rompu mem viajn ĉenojn!

Marcel Boubou (Francio)

Evoluo de la tekniko

Jam ofte aperis artikoloj pri la evoluo de la tekniko kaj senlaboreco. Tio pruvas, ke super la laboristaro flugpendas io maltrankviliga; la laboristoj sentas tion kaj esprimas siajn konkludojn en artikoloj.

Ni nur rememoru, kiom da laboristoj nutris sin per mana teksado — kiam la teksmaŝino estis eltrovita ne la dekono povis esti dungita kaj de tiu dekono restis eble nur la duono post pluaj dudek jaroj!

Kiom da laboristoj perlaboris sian panon per farado de ŝraŭboj — venis la maŝino kaj la efikon sentis la proletoj! Hodiaŭ ekzistas jam maŝinoj, kiuj faras la ŝraŭbojn tute sole, tiamaniere oni bezonas por eble 2—3 maŝinoj nur unu laboriston, kiu observas la funkciadon de la maŝino.

Kiom da laboristoj povis trovi sian panon ĉe la komunumoj, kiam ili estis maljunaj (ofte estis ilia sola savrimedo kontraŭ la malsato)! Ili estis dungitaj kiel lantern- aŭ stratpurigistoj. Hodiaŭ la komunumoj lumigas per elektra forto kaj balaas la stratojn per aŭtomobiloj, kiuj ŝprucas kaj balaas rapidege!

Kiom da muzikistoj perdis sian panon per radio?

Tiuj ekzemploj, kiuj estas nur kelkaj el kelkaj miloj, pruvas, ke per la evoluo de la tekniko minacas al la laboristaro fakte grandega danĝero kaj tiu ankoraŭ pligrandiĝas de tempo al tempo, ĉar la kapitalistoj penas farigi la laboron per maŝino, unue, ĉar la laboro kostas preskaŭ nenion, due, la maŝinoj ne bezonas pagitan libertempon. La malpliigo de la kostoj devus aperigi malaltigitajn prezojn de vivnecesaĵoj — sed la kontraŭo okazas — do, la kapitalistoj enpoŝigas la ĉe laborforto ŝparitan monon. Pro tio estas tute klare, ke la kapitalisto vidas kreski la profiton per uzado de maŝinoj. Sub tiuj kondiĉoj la laboristoj estas la perdantoj kaj oni ankoraŭ ne povas imagi, kia danĝero minacas!

Fakto estas, ke en ĉiuj landoj regas terura senlaboreco — kaj oni ne povas ŝanĝi tion. Oni nur babilas ĉiam, ke eksporto mankas. Kien? Ĉiu lando havas superfluajn laborfortojn kaj ne povas permesi, ke la senlaboreco ankoraŭ pligrandiĝu! La kaŭzo estas, ke la plej grandaj, ĝisnunaj eksportlandoj (Hindio, Ĉinio ktp.) paŝo post paŝo entute ne estos landoj, kiuj vendos aĵojn de Eŭropo, ĉar la kapitalistoj bone flaris, ke tie oni povas havigi pli malmultekostan laborforton! Do ekzistas ankaŭ la danĝero, ke post tempo oni eksportos el Hindio al Eŭropo!

Nun estiĝas la demando, kiamaniere sin defendi kontraŭ tiu danĝero? Ankaŭ en tiu rilato jam estas proponoj faritaj, sed ili ankaŭ taŭgas. Kamaradoj proponas detrui maŝinojn, aliaj lasi evolui la teknikon kaj poste forpreni la maŝinojn de la kapitalisto. Bone, sed ĉu tiu forpreno povas helpi al la senlaboruloj? La fondo de la socialista ŝtato havos jam ĉe la lulilo la malkontentecon, ĉar ankaŭ tiam la maŝinoj fabrikus pli, ol la homaro bezonas — bedaŭrinde ankaŭ uzante nur kelkajn homojn. La mizero, kiu nun ĉiam pligrandiĝas, restos la aldono en socialista ŝtato — kaj tion ni ja ankaŭ ne volas.

Tiu temo estas tre interesa kaj tuŝas la viveblecon de ĉiu laboristo, pro tio estus inda, ke la gekamaradoj sciigu iliajn opiniojn en tiu rilato.

2135·Vieno

Tutplena Kunsido de Blankrusia Centra Komitato de MOPR (IRH)

Mopr (IRH) ekzistas en Blankrusio de novembro 1923 jaro. Kvanto de ĝiaj ĉeloj kaj membraro kreskis de 223 ĉeloj kaj 44400 membroj, I./X.-24 jaro ĝis 953 ĉeloj kaj 95700 membroj, I./I.-25 jaro 2097 ĉeloj kaj 160000 membroj, I./XII.-25 jaro aŭ 4% de tuta loĝantaro de Blankrusio.

De komenc-ekzistado ĝis nun Mopr en Blankrusio kolektis kaj elsendis al Tutrusia Centra Komitato de IRH 170000 orajn rublojn.

C. K. dum sia kunsido 5.—6. de decembro, interalie, decidis, ke de nun ĉiuj lokaj komitatoj kaj ĉeloj de Mopr devas ne nur varbi novajn membrojn sed plej multe da atento destini al edukado, por ke ĉiu membro de Mopr estu klaskonscia batalanto por tutmonda revolucio. Organizi kursojn por Mopraj aktivuloj. Enteni en gvidan Mopran laboron pli multe da laboristinoj kaj kamparaninoj. Disvastigi Mopran literaturon pri vivo, batalo kaj suferoj de laboristaro en burĝaj ŝtatoj. Jen taskoj de nia agado.

Ni petas ĉiujn anojn de IRH korespondi kun ni pri iliaj atingoj en tiu laboro laŭ adreso: Sovet-Unio, Blankrusio, C. K. MOPR.

Jan Klys

La germana registaro provizas sin kun kirasaj veturiloj

IRH — En faŝista militministrejo germana oni preparas sangan subpremon de la malsata laboristaro. Tute publike la germana burĝaro diskutas la demandon pri la neceso de eksterleĝa stato kiel enkonduko de faŝist-militarista diktateco, eble laŭ la metodo de Horthy, Zankoff aŭ Pangalos. Sed oni ne nur diskutas, oni ankaŭ jam faras la praktikan preparlaboron, por okazigi sangverŝon, por kurĉasi la ribelontan kontraŭ malsato kaj mizero proletaron.

La oficiroj de la militistaro kaj de la policistaro ricevis sekretajn instrukciojn kaj batalplanojn. Estas publika sekreto, ke oni tute sisteme koncentrigas trupojn kaj polictaĉmentojn en la plej gravaj industrilokoj. Kaj plue oni funkciigas novajn batalrimedojn en la lokoj kaj distriktoj, kie la entreprenistaro milnombre maldungas la laboristojn.

Ekzemple en la urbo Buer, kiu preskaŭ senescepte estas loĝata de ministoj, jam depost kelka tempo estas lokita kirasa aŭtomobilo, kun kiu la policistaro entreprenis ekzercajn veturadojn "plene kontentigante" la certajn instancojn. La laboristaro de Buer, scias, ke la kirasa aŭtomobilo sole por ili estas destinita, ja ekzistas nun en Buer kelkaj miloj da senlaboruloj, kiuj krias al laboro kaj pano, kaj kiuj ne emas, morti pro malsato kiel senhelpa kreaĵo.

La germana burĝaro ne povas kaj ankaŭ ne volas doni al ĉiuj laboristoj laboron kaj panon. Ĝi ankaŭ volas krei armeon de la mizero, por povi pli facile malaltigi la salajrojn de la proletoj ankoraŭ laborantaj kaj por ankoraŭ povi pli ekspluati ilin. La malsata, mizera armeo tamen postulas, ke oni ĝin plej atentu kaj pro tio en la tuta regno la sistema armigo kaj milita preparo kontraŭ la laboristaro.

Faŝistoj uzurpis kooperativojn en Italio

En sekvo de kvazaŭ antaŭpreparita atenco tra Italio denove estas traruliĝinta la ondo de teroro. Laŭ ordono de milana prefekto (urbestro) estas forpelita malnova estraro de "Lege Nacionale" de Centra Unuiĝo de itala kooperativa movado kaj ĉi organizacio havinta ankoraŭ nelonge 8000 kooperativajn fabrikojn kaj establojn, kalkulinta ĉirkaŭ 2 milionojn da membroj estas transdonita al faŝistoj. Ankaŭ estas forpermesita ĉefa apoga punkto de triestaj laboristoj — Triesta Unuiĝo de laboristaj kooperativoj, kalkulinta 40 milojn da membroj.

Kooperativaj organizaĵoj de Sovet-Unio sendis al Mussolini la sekvantan telegramon "Kun grandega malĝojo ni eksciis, ke faŝistoj uzurpis oficejon kaj havaĵon de "Lege Nacionale" en Milano kaj forpermesis triestan konsumkooperativan unuiĝon. Ĉi

tiuj okazintaĵoj sekvigas grandan indignon inter vastaj kooperativaj masoj en Sovet-Unio. Kooperativaj organizaĵoj kalkulantaj 15 milionojn da kooperativanoj opinias, ke estas necese sciigi vin pri ĉi tio kaj atingi ordonon pri redono de "Lege Nacionale" al malnova estraro kaj ankaŭ pri nuligo de ordono pri forpermeso de triesta konsumkooperativo kaj pri garantio al itala kooperativa movado de ebleco por libera ekzistado.

La kooperativaj organizaĵoj de la tuta mondo protestu kontraŭ faŝista rabado.

Baranov.

La movado de la profesiaj asocioj en Litovio

Parte oni povas diri, ke la grandeco kaj vigleco de profesia movado de iu lando montras la gradon de disvolvo rilate konscion de la proletaro en la nomita lando. Sed tia penso estas prava nur koncerne tiujn landojn, kie la reĝaro ne starigas maleblajn kondiĉojn, aŭ en tiaj landoj, kie la laboristaj organizaĵoj jam estas tiel disvastiĝintaj kaj viveblaj, ke ili povas kontraŭbatali kaj luktadi kontraŭ ĉiuj atakoj de la kapitalistoj kaj iliaj reĝaroj. Sed koncerne la landojn kie la industrio ne estas tiel disvastigita, ke la proletaro, laŭ ĝia multnombreco, povus krei fortajn laboristajn organizaĵojn, kiuj en ĝia vico povus kontraŭstari ĉiujn atakojn de la reĝaro kontraŭ laboristojn. Do, la stato de la disvolvo de profesia movado ne esprimas la certan gradon de konscio de la proletaro en la nomita lando. La ĝeneralan rolon tie-ĉi ludas la plifortiĝo aŭ malplifortiĝo de reakcio de la reĝaro kontraŭ laboristojn.

De komenco, en la unuaj tagoj de ĝia memstareco, kiam Litovio komencis konstruiĝi, kiam ĝia burĝaro ankoraŭ ne sciis, kion alportos la morgaŭa tago kaj en kia formo elverŝiĝos tia "memstareco", kaj entute pri ĝia natura timemeco (entute la netimemeco de burĝaro esprimas sin nur per aroganteco) ĝi, la burĝaro, rigardis tra la fingroj al ĉiuj organizaj agoj de la laboristoj kaj kampanoj, ĉar ĝi timis, ke se ĝi hodiaŭ malkaŝe kontraŭbatalos kontraŭ tion, tiam, eble, ke ĝi devos morgaŭ tro kare rekompenci pri tio. Sed kiam ĝi pli multe komencis senti, ke la fundamento sub ĝiaj piedoj jam ne tiom ŝancelas, ĝi komencis senhonte elmontri malkaŝe siajn sekretajn intrigojn kontraŭ laboristaron kaj alvenis ĝis tia punkto, ke nun entute estas maleble por organiziĝi plimalpli fortajn profesiajn asociojn, kiuj povus kolektive defendadi la bezonojn kaj pravajn postulojn de la laboristaro. Per unu vorto, la litova burĝaro kaj pastraro nun estas plena mastro je la sano kaj vivo de la litovaj laboristoj.

En jaroj 1920—1921 la profesia movado en Litovio estis, kompare, sufiĉe forta. Preskaŭ en ĉiu pli granda urbo kiel Kaunas, Ŝiaŭliai, Vilkoviŝkis, Panevèžys kaj aliaj estis profesiaj asocioj kun kulturaj, dramataj, sportaj kaj aliaj sekcioj, de kiuj ĉiu asocio kalkulis en ĝiaj vicoj pli ol kelkajn milojn da laboristoj. Ne pli malbone ankaŭ estis konstruitaj la profesiaj asocioj de terlaboristoj. La distriktoj Ŝiaŭliai, Mariampolè, Rakiŝkis, Vilkaviŝkis, Raseiniai kaj aliaj ankaŭ ĉiu kalkulis po kelkaj miloj da membroj. Ĉirkaŭ Centra Komitato de la Profesiaj Asocioj en Kaunas koncentriĝis ne malpli ol tridekkvin miloj da organizitaj laboristoj kaj vilaĝanoj kio por Litovio, en tiu tempo, estis ne malmulta nombro. La laboristaro povis tiam donadi kaj donadis al la labordonantoj kolektivajn postulojn en urbo kaj vilaĝo, organizis, kiam necese estis, strikojn, disvolvis inter siaj membroj kaj entute en laboristaj amasoj vastan civilizigitan laboron. Kaj certe, dum la sep jaroj de litova samstareco la du jaroj, 1920 kaj 1921, estis por la laboristaro, kompare, la plej lumaj kiel de ekonomia tiel ankaŭ de la organiza flanko.

Tamen, kiel jam estis dirite, ju pli la litova burĝaro komencis senti malmolan fundamenton sub ĝiaj piedoj, des pli ĝi komencis atakadi la fortikaĵojn de la laboristoj — la profesiajn asociojn. Ĝi komencis fermigi unu filion post alia, por enkarcerigi la membrojn de la administracio kaj aktivajn laboristojn kaj vilaĝanojn kiel komunistojn. Tio estis la unua kaj sufiĉe sentinta frapo de laboristaj organizaĵoj. Kaj plie-plue. Dum unu belega tago estis eldonita dekreto, ke de la nuna tago kaj plue devas esti fermitaj ĉiuj profesiaj asocioj kaj iliaj sekcioj, ĉar ili estis nestoj de bolŝevismo. Do, per unu pluma streko de burĝulo kaj pastro en sia kabineto, oni fermigas multnombrajn organizaĵojn de laboristoj kaj vilaĝanoj, kiaj estis kreitaj dum tia penado. Tiu ĉi dekreto estis akompanita je tre grandaj arestoj: po centoj da laboristoj kaj vilaĝanoj iras tra la malliberejo — jena sola universitato por proletaro en burĝaj landoj — nur pro tio, ke ili ekkuraĝis partopreni en institucioj, kiuj starigis al ili celon por plibonigi la vivkondiĉojn de laboristoj.

Por disigi la unuecon de la laboristoj, la reĝaro uzas la rimedon de la cara servisto Zubatov: t. e. elsendas siajn agentojn por organizi naciajn profesiajn asociojn sub la masko de Darbo-Federacio (Federacio de laboro) promesante al laboristoj multajn privilegiojn. Kiam tio ne helpas, tiam la Labor-Federacio, kune kun la fabrikantoj, elĵetas el la uzinoj laboristojn nevolontajn enskribiĝi en ĉi porprovokatoraj asocioj. La plej persistajn ili enkarcerigas.

En la nuna tempo en Litovio preskaŭ ne ekzistas profesiaj asocioj ne kalkulante unu — alian. En la ekzistantoj oni ne povas, pro la reakcio, ne nion fari: malofte oni povas organizi strikon aŭ aranĝi kunvenon. Ĉar en ĉiu kunveno partoprenis policanoj kaj spionoj. Ili eĉ malpermesas paroli per la lingvo, kiun la laboristoj komprenas. Ekzemple, antaŭ nelonge, estis dispelitaj en Kaunas kaj Jonavo laboristaj kunvenoj, ĉar ili ekpermesis al si paroli polan, judan kaj rusan lingvojn malbone komprenante litovan. Tamen en la Memela sejmelis (landtago), kie la litovaj deputitoj konsistas nur du el dudeknaŭ, ili postulas kaj eĉ minacas, ke estu parolata litova lingvo apogante je demokratismo forgesante, ke samtempe ili ĉe si hejme piedfrapadas la saman demokratismon.

Pri kreo de profesiaj asocioj en la regnaj entreprenoj kiel poŝto, fervojo kaj aliaj estas tute neeble, kiel ĝenerale estas maleble krei iujn ajn profesiajn asociojn. En Joniŝkis oni arestis dekon da aliaj fervojistoj kaj kulpigis ilin je bolŝevismo nur pro tio, ĉar ili kunvenis por trakti pri kreo de profesia asocio de sia metio.

Tiel paroli pri ekzisto de iuj profesiaj asocioj estas maleble, ĉar ili preskaŭ tute ne estas: la tuta nombro de iliaj membroj ne superas 1500. La proletaro de Litovio jam sufiĉe bone sentas tion dum sia nuna ekonomia stato. Sed pri tio alian fojon.

Iz. Neritis.

La demando pri instruista striko

Estas opinio tre disvastiĝinta, ke striko ne povas esti armilo de la instruistaro. De tempo al tempo, la instru-sindikatanoj pripensas la demandon ĉu okaze de korporaciaj postuloj, ĉu de politika protesto.

Kutimaj argumentoj kontraŭ la striko estas jenaj: Sukcesonta striko devas profunde vundi la profiton de la mastro kaj per instruista striko, la ŝtato-mastro neniel estas ekonomie ĝenata. La instruistoj estas disigitaj tra tuta lando kaj ne povas facile kuniĝi kaj amase manifesti. Dum laborista striko aŭ manifestacio, la instruista rolo eble estus resti en lernejo por gardi la infanojn, for de la stratdanĝeroj.

La faktoj multfoje montris, ke la ĉi supraj pravigoj ne direktas, sed nur modifas la finan decidon de la malkontenta instruistaro. Instruista striko profunde vundas la burĝaran ŝtaton en sia fierego kaj en sia aŭtoritato. La instruistaj strikoj preskaŭ ĉiam sukcesis, ĉar ili estis imponaj manifestoj de tutlanda aŭ tutregiona instruistaro, ofte en interligo kun striko de ĉiuj ŝtatoficistoj. Tiuj strikoj ĉiam okazis en plena interkonsento kun la gepatroj kaj la cetera laboristaro.

Certe malfacila por instruistaro, kiu devas zorgi pri gravaj flankaĵoj, la striko restas armilo ankaŭ de la instrulaboristoj, ĉu kiel ekonomia batalilo ĉu kiel revolucia protestilo.

Kvankam simpla protesta striko unuhora aŭ unutaga estis plejofte sukcese uzata, faktoj ankaŭ montras, ke laŭ regionaj aŭ specialaj cirkonstancoj la instruistoj devis uzi en kelkaj landoj longedaŭran strikon tutsemajnan eĉ kelkmonatan kaj fine sukcesis.

En Anglio, kvarfoje, de la milito la instruistoj uzis strikon ĉu por atingi salajraltigon, ĉu por malhelpi malaltigon. La gepatroj apogis la postulojn de la instruistoj kaj plejmultaj ne sendis siajn in-

fanojn en la lernejon. La instru-helpantoj de la aliaj regionoj rifuzis solidare peti postenojn en la strika regiono kaj la anstataŭantoj komisiitaj ne povis daŭrigi la instruon en la koncernaj postenoj pro klaskonscio vekiĝanta aŭ timo je sarkasmoj. La strikokomitato zorganta la intereson de la gepatroj kaj infanoj organizis inter mi-ingoj ekskursojn sur kamparo en kiuj la lernantoj estis invititaj. Unu striko daŭris kvar monatojn kaj finsukcesis.

En Italio dum 1921, la tutlanda instruistaro strikis unu semajnon por altigi mizerajn salajrojn: ili sukcesis. En Portugalio kaj en Rumanio okazis strikoj de ŝtatoficistoj en kiuj la instruistoj partoprenis. En Lodz (Polio), dum novembro 1924, la instruistoj kaj profesoroj de real-kaj komerc-lernejoj strikis por trudi aplikon de la voĉdonita salajra skalo kaj pagon de 12 monatoj (anstataŭ 10).

En Saksio, la 15. de februaro 1919, la unuiĝo de la Leipzig'aj instruistoj decidis striki por salajra plialtigo, malpliigo de la semajna lecionnombro. Forigo de la direktoroj kaj aŭtonomeco de la lernejoj. Ĉar plenumiĝis la postuloj, ne okazis la striko.

Konvenas rimarki, ke la Nacia Sindikato de francaj geinstruistoj, en sia lasta kongreso (aŭguston 1925), aplaŭdis proponon de sia prezidanto, kamarado Roussel, pri unutaga protesta striko de tutlandaj instruistoj por eltiri de la registaro la jam de longe promesitan salajr-altigon. La Nacia Sindikato, kiu grupigas nuntempe la plimulton de la franca instruistaro, havas pli ol 70000 anojn kaj kvankam ĝi aliĝis de lasta kongreso al la Konfederacio Ĝenerala de la Laboro (CGT), el la Amsterdama Internacio, ĝi estas ankoraŭ tre malforte sindikalista.

La Federacio de l' instruistaj sindikatoj en Francio, kiu apartenas al la Moskva Internacio, plene aprobas kaj subtenas tiun proponon pri amasa, unueca kaj impona striketo; en 1919, tiu federacio tre avangarda jam akceptis eĉ principon de protesta revolucia striko por pruvi la solidarecon de la instruistoj kun la cetera proletariaro luktanta kontraŭ la milito, batalanta por amnestio aŭ reoficigo de la ŝtatlaboristoj kaj fervojistoj, ktp.... Sekve de ĉi tiu rezolucio, la sindikato instruista en Marseille strikis la unuan de majo 1920 multope: unu kamaradon oni pro tio senoficigis.

En 1922, la geinstruistoj el Bruselo (Belgio) organizis modele unuhoran strikon, kiu plene sukcesis. Ĝi kunigis ĉirkaŭ 300 geinstruistojn el 17 lernejoj. La celo estis respondi al insultaj paroloj de urbestro patriotaĉa Max, kiu deklaris neebla plialtigi la instruistajn salajrojn dume proponante malaltigi per 8 milionoj la komunumajn impostojn por la "noktkafejoj". Okazis punoj (nur 3-taga senigo de salajro), sed vigla agado reduktis aŭ nuligis la deciditajn punojn.

La instruista ŝtriko estas do fakto. La proletarieca stato de la instrulaboristo devigas lin uzi proletariajn batalrimedojn. Eĉ malplej sindikalistaj instruistoj uzis strikon. Ju pli amas-unueco estas instruista striko, des malpli timenda estas posta senoficigo. Certe pli facilaj estas strikoj lokaj regionaj aŭ urbaj, kie la instruistoj estas pagataj ĉefe de komunumoj aŭ distriktoj. Malofte uzas strikarmilon la instruistaro, nur pro ne sufiĉe hardita sindikalisma edukado en tiu korporacio. La obstakloj, kiujn, renkontas facile punebla instruistaro luktanta kontraŭ preskaŭ nevundebla ŝtato-mastro, povas nur firmigi revolucieman opinion de la plej sindikalistaj instruistoj pri maksimuma postulo: neniigo de burĝara ŝtato-mastro per detruo de kapitalismo.

Marcel Boubou (Francio)

≡ DISKUTEJO ≡

Al ĉiuj sinceraj unuecfrontanoj

(Fino)

"Sennacieca Revuo"

"Senn.-Rev." estas organo eduka, proletkultura. Sed ĝis nun ĝi ne sukcesis altiri la SAT-anojn al aktiva partopreno en la kreado de l' revuo; ili restas ĝis nun nur pasivaj legantoj kaj tro malmultaj kunlaboras pli-malpli aktive; sed ankaŭ ĉi-lastaj ne estas sufiĉe interligitaj kun la redaktanta grupo. Tia stato estas nepre likvidenda, se ni deziras, ke "Senn.-Rev." bone plenumu sian rolon de proletkultura edukilo sennacieca. Estas do necesa reorganizi la internan strukturon de l' revuo kaj trovi taŭgajn organizoformojn por altiri la legantaron al organizita kunlaboro kaj starigi inter ĝi kaj la redaktantaro aktivan interligon konstantan. Tia kunlaboro de l' legantaro akcelos la interproksimiĝon de l' diverslanda SAT-anaro kaj helpos la formigon de specialaj fakgrupoj en SAT. (Kiamaniere, en kia formo realigi la reorganizon de "Senn.-Rev." — tiu-ĉi temo estas speciale diskutenda).

Nia koopera Eldonejo

La rolo de l' ceteraj (neperiodaj) SAT-eldonaĵoj estas same eduka, proletkultura. La speciala karaktero de nia Eldonejo kaj ĝiaj taskoj estas temo tre grava kaj meritas multe pli grandan atenton de la SAT-anoj ol ĝis nun. Necesas do speciale ĝin pritrakti. Ĉi-tie mi nur notu, ke elektante verkojn por eldono la gvidantoj de l' Eldonejo devas rigore obei la ĉefprincipojn, sur kiuj estas konstruata la tuta agado de SAT: klasbatalo, unuecfronto, proletkulturo sennacieca. Por altiri la intereson de niaj asocianoj al tiu-ĉi afero estas necese larĝe pridiskuti ties laborplanon kaj grupigi en la kadro de SAT specialajn rondojn da k-doj, kiuj havas deziron progresigi la entreprenon kaj aktive kunlabori por ĝi.

Atentigu unu la alian pri renovigo de abono por Sennaciulo.

Fakoj en SAT

Por ke SAT fariĝu reale aganta proletkultura organizaĵo, estas absolute necese, ke en ĝia kadro formiĝu fak-grupoj, kiuj celos:
interne de SAT — prilabori faktemojn laŭ la vidpunkto proletkultura sennacieca kaj progresigi la koncernajn fakojn en "Senn.-Rev." kaj la Eldonejo,
ekster SAT — varbi por SAT kaj sennaciismo samfakulojn en ĝeneralaj fakorganizaĵoj naciaj kaj internaciaj kaj ankaŭ en esp-istaj fak-organizaĵoj.

SAT kaj tendencorganizaĵoj

En SAT ne devas ekzisti tendencfrakcioj kiel konstantaj internaj organizaĵoj: por la bona funkciado de SAT tiaj frakcioj estas ne nur nebezonataj, sed eĉ malutilaj. En la kadro de SAT ni estu antaŭ ĉio unuecfrontaj kunlaborantoj sur la komuna kampo de proletkulturo sennacieca samkiel en sindikato ni estu antaŭ ĉio klasbatalaj sindikatanoj.

Sed ... tendencoj ekzistas ja en la laborista movado. Ni povas bedaŭri ĉi-fakton, sed tamen ĝi restas reala fakto. Kaj ni ne povas, nek devas permesi aŭ malpermesi al ĉiutendencaj proletesp-istoj — ĉu SAT-anoj ĉu ne-SAT-anoj — kuniĝi kaj formi laŭ sia plaĉo diversajn organizaĵojn ekster SAT. Ne estas la afero de SAT miksi sin en la aferojn de diversaj tendencoj, des pli ke ne ĉiuj proletesp-istoj estas membroj de SAT. Sed SAT ne povas rilati tute indiferente al tiaj tendencorganizaĵoj proletesp-istaj. Ĝi rajtas postuli de la SAT-anoj, ke en sia tendencorganizaĵo ili ĉiam zorgu, ke ĉi-lasta neniam faru laboron paralelan kun la laboro de SAT, ke ĝi neniam konkuru kun SAT. ke ĝi ĉiam faru sole sian specialan laboron, Samtempe nia asocio rajtas postuli de la SAT-anoj, ke, estante membroj de tendencorganizaĵoj proletesp-istoj, ili varbu en ĉi-organizaĵoj novajn membrojn por SAT.

Tiamaniere la ekzisto de tendencorganizaĵoj proletesp-istaj (kaj iliaj gazetoj) ne nur ne malhelpos, sed eĉ akcelos la progresadon de SAT, samtempe pruvante per sia speciala karaktero la kreskon kaj vivecan diferenciĝon de l' proletesp-ista movado.

Por sia tendenco ĉiu el ni laboru en sia tendencorganizaĵo. Por sennacieca proletkulturo ni ĉiuj kune laboru unuecfronte en nia komuna organizaĵo — SAT.

La sola rimedo

Jen tia estas la ĝenerala laborplano, kies realigo (post serioza kaj detala pritrakto de ĉiu el ĝiaj partoj) estas — laŭ mia profunda konvinko — la sola restinta rimedo por konservi, restarigi kaj progresigi nian asocion.

Se SAT estas efektive necesa organizaĵo (kaj mi neniom dubas pri tio), ĉiu vera sennaciulo-unuecfrontano devas plej aktive, plej energie partopreni en tiu sincera kunlaboro.

Aŭ — sana kaj laborkapabla SAT-movado ne ekzistos. *J. Zilberfarb* (1334)

Pri malsanoj

Mi atente sekvas ĉi diskutadon, kiu estas tre interesa kaj por la laboristoj, ne studintaj la medicinon, tre utila. Jen la opinio el "larĝaj laikaj rondoj":

Krom tromanĝado kaj malbona manĝajelekto estas ankoraŭ unu, tre grava, forigenda faktoro, kiu minacas nian sanstaton. Ĝi nomas — la kapitalista sociordo.

Jen kion skribas la laborista korespondanto en "Pravda", la gazeto de la kompartio en Ĉeĥoslovakio.

Sabaton la 12. 12. okazis en "Svatý Kríž" lumbildparolado pri korpflegado aranĝita de la "Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco". La paroladisto klarigis, ke la plej gravaj kaŭzoj de malsanoj, precipe de la tuberkulozo estas nesufiĉa nutrado de la labormasoj, malgrandaj kaj malsanigaj loĝejoj por loĝado ne kapablaj, tropenado de la fizikaj fortoj kaj fine malpuremo.

Nun kompletigas la korespondanto.

Batalado de la Ĉ. R. K. kaj de "Masaryk'a Ligo kontraŭ tuberkulozo" estas nesufiĉa, ĉar dum la Ruĝa Kruco estas ŝtate subvenciata, oni permesas senekzemplan salajran malaltigadon kaj samtempe permesas prezkreskadon de la vivbezonaĵoj. Estas facilkompreneble, ke laboristo perlaboranta nun, kompare kun la antaŭmilita tempo 4½—5½ oble pli kaj la prezoj de la vivbezonaĵoj plialtiĝis 9—12 oble iuj objektoj eĉ pli, ne povas aĉeti tion, kion li bezonas por reakiri la perditajn fortojn. Kontraŭe, li estas en fabrikoj, minejoj ktp. devigata pli intense labori, kion pruvas la oficialaj statistikoj.

La loĝejmizeron oni devas forigi per radikalaj rimedoj.

Fabrikoj zorgu loĝejojn, klubejojn, gimnastikejojn ktp. por siaj laboristoj.

Por malsanaj laboristoj servu somerrestadejoj de la caraj nobeloj kaj kortegaj altranguloj.

Evidentiĝas, ke la laboristoj devas kuniĝi, krei komunan, batalpretan laboristfronton kontraŭ la kapitalismo, kaj per tio ili ankaŭ kontraŭbatalos la teruran malamikon de la proletaro — la tuberkulozon.

Tiel la artikolo kaj necesas nur kelkaj klarignotoj.

La ĝisnunaj artikoloj traktis la demandon el la vidpunkto scienca, sed oni devas ankaŭ konsideri pri aĉetpovo de la laboristoj pri la ekonomiaj kaj sociaj cirkonstancoj. Kompreneble, la mizero mem ne kaŭzas malsaniĝon, sed senfortigita korpo malfacile rezistas kaj sekve de tio estas facile venkebla.

Rezulte: Malutilas tromanĝado kaj la aliaj faktoroj en la antaŭaj artikoloj cititaj, sed pleje malutilas la kapitalista sociordo. Kaj la kuracilo? *Laiko (5194)*

Sindikatoj aplikas Esperanton

Letero sendita de subskribita ligo, al kongreso de svedaj k-doj, kiu okazos de 23—24 jan. en Göteborg.

Karaj Kamaradoj!

Ni deziras al via kongreso multe da sukceso kaj esprimas al la svedaj laboristoj nian plenan solidarecon en la batalo kontraŭ la sveda kaj tutmonda burĝaro.

Estas nia deziro ke vi esprimu vin por la unuigo de ĉiuj laboristoj en unu internacionalo ruĝa, ke vi batalu kiel eble plej akre kontraŭ la faŝismo kaj strikrompantoj, ke vi subpremu la nacian ŝovinismon, kiu estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la disŝireco de laborista movado kaj instigilo por novaj imperialistaj militoj.

Plue ni deziras, ke lingvo internacia disvastiĝu kiel interkomprenilo de la tutmonda proletaro kaj ke ĝi fariĝu batalilo kontraŭ la internacia burĝaro, ni vigle laboras inter la proletaj esperantistoj krom multaj E.-kursoj kiuj estas ĉi tie, sekcio de ruĝaj metallaboristoj aranĝas kurson por siaj membroj. Ankaŭ komunista gazeto "Pravda" skribas favore pri esperanto kaj havas siajn proprajn esperanto-korespondantojn.

Plzen, la 7. 1. 1926

Por: internacia ĉiu-profesia ligo
en ĉekoslovaka respubliko sekretario
en Plzen, Masarykovo ná. 19
Meztek Rudolf, sekretario

Atentu gekamaradoj!

La tutlanda ĝenerala kongreso de la "ruĝa unuiĝo de ĉiuprofesiaj sindikatoj" en Ĉekoslovakio okazos de la 25. ĝis 29. januaro 1926 en Praha, ĉefurbo de Ĉekoslovakio. Dum tiu kongreso kunvenos delegitoj el ĉiuj urboj kaj lokoj de la lando por priparoli la sekvontajn laborojn de la unuiĝo. Se vi volas, ke la gvidantoj favoru la intern. lingvon, tiam penu en via loka sindikato aŭ organizaĵo, ke ĝi sendu en Ĉ. salutleteron rekomendante esperanton.

Precipe la rusajn k-dojn mi atentigas, neniu el vi prokrastu sendi tian E. rekomendan salutleteron, ĉar vi trovas la plej grandan influon sur tiu-ĉi organizaĵo!!

Ĉiu SAT-ano sendu laŭ jena adreso: II. Radný Sjezd M. V. S. Sekretario Josef Hais, Jrĉná ul. 509—10, Praha, Ĉekoslovakio.

Sur la letero notu: "En Esperanto".

SAT-ano 409



Nova poŝtkarto, oficiale eldonita en Sovet-Unio

Tiu ĉi poŝtkarto aperis en poŝta trafiko la 2. Januaron 1926. Aperis 6 diversaj specoj de ĉi PK, konforme al 6 naciaj lingvoj oficialaj de Sovet-Unio, nome:

1. en rusa, franca kaj esperanta
2. en ukraina, franca kaj esperanta
3. en blankrusa, franca kaj esperanta
4. en kartvela, franca kaj esperanta
5. en tjurka, franca kaj esperanta
6. en armena, franca kaj esperanta

Noto de Red.: Por ŝpari lokon kaj monon, ni nur kliŝigis la supran parton de la poŝtkarto.

SAT-anoj!

Nia gazeto "Sennaciulo" liveras al vi bonegan dokumenton en la manon (La letero de la intern. ĉiuprofesia ligo en Ĉekoslovakio al svedaj k-doj) kiun vi uzu kiel argumenton en la lokoj, kie ankoraŭ niaj k-doj kredas al "Ido" aŭ por konvinki tiujn, kiuj ankoraŭ malfavore kaj skeptike rigardas nian movadon. Eĉ la ĉekosl. k-doj mem povas plej bone uzi ĉi dokumenton. Ne restu ĉi letero vana krio ĉiu klopodu plene ĝin eluzi. Kiuj k-doj ĝin represos bonvolu sendi la n-on al mia adreso. *409, Pilsen (Plzen)*

La nova moro kaj novaj nomoj

La nova moro en USSR ludas grandan rolon. Mi opinias en ĉi artikoleto priskribi unu flankon de moro: pri novaj nomoj.

Ĝis oktobra revolucio, trarigardante la malnovan kalendaron ni vidis multajn nomojn en memoro de diversaj sanktuloj.

Depost revolucio ni renkontas multajn novajn nomojn en memoro de niaj ĉefoj kaj gvidantoj.

Nuntempe estas nova nomo "Ninel", kiu devenas de nomo Lenin, sed legu ĝin de fino ĝis komenco. El ĝi fondiĝas la nova nomo ina "Ninelina".

Ankoraŭ estas tre bonsona nomo: Vladilen" — kiu estas kunmetita el komencaj literoj de nomo *Vlad*-imir *I*-ljiĉ *Len*-in.

Krom tio ekzistas nomoj en memoro de niaj ĉefoj kaj gvidantoj: *Klara* Cetkin, *Karl* Libkneĥt, *Roza* Luksemburg.

En nia esperantista moro ni ankaŭ povus proponi kelkajn nomojn kunligitajn de laboro de nia ĉefo Zamenhof kaj verkita de li en la lingvo Esperanto. Ni proponos novajn nomojn:

"Esperantino", "Esperino", "Espino".

Kamaradoj, estas dezireblaj viaj proponoj.

B. Belakov.

RECENZEJO

Libroj

Cours Rationel et Complet d' Esperanto. Dua Eldono. — Eldonejo: Fédération Espérantiste Révolutionnaire, 23 bis, rue Morère, Paris 14. Formato 12½×19½ cm, 208 pĝ. broŝ. prezo: 6.— fr. fr.

Tiu ĉi lernlibro ampleksas du partojn kun multaj ilustraĵoj. En la unua — la ĉefa — kiu konsistas el 17 lecionoj (apud prepara la kompletiga leciono) estas detale prezentataj la reguloj de Esp.

La dua parto estas eltiraĵo en 12 ĉapitroj, sen ĉiuj gramatikaj akcesoraĵoj. Ĝi klarigas la sintaksajn rilatojn de franca kun la internacia lingvo.

La prezentita libro, kiu estas taŭga tiel por intelektulo kiel por simpla laboristo, estas kompilita laŭ plano, kiu permesas al ĉiuj gek-doj lerni la lingvon sola.

En la verko estas konscience priatentata, ke iom post iom oni venas de facilaĵo al la malfacilaĵoj. Unuvorte la libro estas precipe verkata por laboristoj.

Ĉe la fino troviĝas vortaro — franca esp. kaj esp. franca. Sur la kovrilaj paĝoj estas reklamoj por SAT kaj ĝia literaturo.

La verko meritas vastan disvastiĝon.

F. C. R.

Esperanto-Lektüre de *D-ro Emil Pfeffer*. Eldonejo: Verlag *Paul Knepler* (Wallishausser'sche Buchhandlung). I. Lichtensteg 1. *Wien*. Formato: 18×13 cm, pg. 31 broŝ., prezo: 0,40 mk. germ.

Tiu ĉi libreto enhavas rakontojn kaj poemojn. Ĝi konvenas por komencantoj kaj kursoj. Sub la esp. teksto troviĝas la germana tratuko. Lingvaj kaj literaturaj klarigoj pli faciligas la tekston.

Galerio de Zamenhofoj kolektita de *Eduardo Wiesenfeld*, L. K. Eldonejo: *Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln*. Formato: 17½×11½ cm, pĝ. 78, broŝ., prezo: 1.— mk. germ. Aranĝo bona.

Jen bona libro por tiuj, kiuj deziras pli konatiĝi kun la familianoj de D-ro Zamenhof. La unua parto enhavas la bibliografiojn de la, en la dua parto troviĝantaj 19 portretoj kaj fotaĵoj.

Teknika Vortareto de *Rektoro P. Trarbach*. Eldonejo: *Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln*. Formato: 15×11½ cm, pĝ. 15, prezo: 0.35 mk. germ.

Ĉi-vortareto enhavas kolekton da vortoj por pedagogio, logiko kaj psikologio. Post la esp. vorto sekvas la sama en germana, franca kaj angla lingvoj.

Deklaracio pri la vero. Eldonejo: *S. R. Martin*, 43, Calmont Road, *Bromley*, Kent, Anglio. Dua eldono, formato: 18×12 cm, pĝ. 51, broŝ., prezo: senpage.

Rolo

Gazetoj

"Internacia Lingvo", duonmonata propaganda kaj instrua gazeto de CKSEU n-oj 1, 2, 3, 4.

La unuaj kvar numeroj de tiu ĉi nova ruslingva gazeto montras la vastan programon, ĉefe propagandan: abundaj artikoloj pri lingvo internacia ĝenerale, pri Esperanto, ĝia historio kaj praktikado, pri SAT, artikoloj pri metodoj de propagando kaj organizo de esperanta movado.

Preskaŭ trionon de ĉiu numero okupas la interna parto, prezentanta kompletigon kaj detaligon de la lernolibro de Lidin. Komencante de n-o 3 en ĉiu numero estas donataj komentariaj artikoletoj por SAT-lernolibro "Petro", konsistantaj el demandoj, ekzercoj kaj vortara materialo por ĉiu el rakontoj de Petro.

Represis el Senn.: *"Tiĥo-okeanskaja zvezda"* (*"Pacifik-oceana stelo"*), n-o 34 de 12. 7. 1925 (aperas en urbo Ĥaborevsk, Siberio) enpresis artikolegon "Sankta jaro en la Vatikano". *"Amurskaja Pravda"* (*"Amura Vero"*), n-o 1534 de 19. 5. 1925 (aperas en Blagoveŝĉensk, Siberio) enpresis tradukon (el 27. n-o de "Senn.") "En demokratia Ĉeĥo-Slovakio".

"Sächsische Arb.-Zeitung" Leipzig. 31. 12. 1925. Antaŭ la Tutsovetia Kongreso de la Societo de Radioamikoj. Senn. 67. *"El Socialista"* (Madrid), 27. 10. 1925. La int. socialista kongreso kiu okazis Marseille (Senn. 55). *"Le Belleviloise"*, (n-o 22). En Svedio (Senn. 47). *"Socialdemokratas"*, (n-o 44) 5. 10. 1925. Letero el Turkio (Senn. 49). *"Roboĉaja Nedeja"* (Laborista Semajno), n-o 40, 31. 10. 1925. "Invento de laboristo" (Rakonto en du ĉapitroj). Situacio de laboristoj en Berlin (Senn. 53). *"De Tribune"*, (Amsterdam), n-o 53, 1. 12. 1925, Rusa lab. gvidanto pri Esp. (Senn). *"Auckland Labour News"* 2. 11. 1925, La sindikata festo en Leipzig 1925 (Senn. 44); Kelkaj vortoj pri la voĉdonado en Belgio (Senn. 31); Sceno el el la vivo de germana ministo (Senn. 26); *"Schlesische Arb.-Zeitung"* (Breslau), 22. 12. 1925, La terurreĝimo de Primo de Riveras (Senn. 64) *"Der tägliche Beobachter"* 29. 10. 1925 (Senn.) *"Der tägliche Beobachter"* 4. 12. 1925 (Senn.). *"La Vie Ouvrière"* (Paris), 4. 12. 1925, Krio de Netolerebla Doloro (Senn. 58)." *Le Libére"* (n-o 153), 15. 12. 1925, Letero el Turkio (Senn. 49). La gazeto "Malodaja Gvardija" (Juna Gvardio") en la n-o de *1. oktobro 1925* citas gravan rolon SAT en starigo de internacia korespondado inter ĉiulandaj laboristoj. Ĉi-gazeto aperas en siberia urbo *Blagoveŝĉensk*.

Represis el S.-R.: *"A Patria"* (Loanda), 10. 9.—5. 10. 1925 (n-o 33, 36, 38, 39). Perspektivoj de Radiotekniko, S.-R. n-o 6, 7, 8 1924. *"A Patria"* (Loanda), 27. 10. 1925, Internacia Brodkastado, S.-R. *"Der Freidenker"* (Berlin,) n-o 10, S.-R. 12. *"Bergische Arbeiterstimme"*. 2. 11. 1925, Kiam mi estis azeno! S.-R.

Lansbury's Labour Weekly, London, 24. 10. 25. Sekve de art. de Mark Starr, la Idistoj protestas, pro la akcepto de Esp. de TUC. — British League Esp. Socialisto propagandas sekve la art. de Mark Starr. *A Internacional, Lisboa*, 31. 10. 25. SAT-programon. *"Arbeiter-Zeitung"*, Frankfurt a. M. 22. 10. 25. Enhavas art. pri la Esp. Poŝtmarkoj k. kartoj! Esp. ĉe la Poŝt kaj telegrafista. *"Naŝ Rutj"* 29. 10. 25 unuigo! J. Roth. La germana deligitaro lab. plenumas sian devon! el let. de W. B. al E. Iz. *"Germana Esperantisto"*, Berlin, Nov. 25. La Popov afiŝo. *"L' Humanitè"* (Ed. du Midi) Nimes, 7. 11. 25. Esp. akceptata de P. T. T. M. Roux. *"Gazeta Gornicza"* (Minlaborista Gaz.), 7. 11. 25. Novaj triumfoj de Esp., akcepto de Esp. de la anglaj sindikatoj. *"Oswiata"* (n-ro 9—10), raporto pri la V. SAT-kongreso. *"The Post"*, London 21. 11. 25. "Akcepto de Esp. de la Universala telegrafia unuiĝo! *"Esperanto"*, Geneve, nov. 25, re-

La "sankta jaro 1925"

(Impresoj de SAT-ano en Romo)

Petro Frapviando (920)

Pri la "sankteco" de la ĵus finiĝanta jaro multaj proletoj certe nenion rimarkis. Sed tamen la plej granda kontraŭulo de homa klereco kaj de kultura progreso, la katolika eklezio, ĝin deklaris "sankta". Ĉiu 25-jare por daŭro de unu jaro estas malfermata la "sankta pordo" en la katedralo de St. Petro en Romo. Dum la solena malfermo de ĉi preĝej-enirejo, okazinta kristnaskon 1924, la papo deklaris la komencon de la "Anno Santo MCMXXV".

Laŭ katolika doktrino la homa korpo estas loĝejo por pekoj. La kredema, pia katoliko, konvinkita pri tio, nun akceptas la okazon por eligi kvanton da pekoj el sia "loĝejo por la animo", li pilgrimas al Romo. Parto pilgrimas piede, multe pli granda parto pilgrimas vagonare. (La itala ŝtato donas al pilgrimoj 33⅓% rabaton en la fervojo). De la malmultaj piedpilgrimoj la plej granda parto nek estas katolikoj nek kredas al aliaj dioj. Iamaniere ekhavinte la "pilgrimlegitimacion", ili nun eluzas la senpagan okazon, tramigri la landon, kie floras la citronoj, faŝistoj kaj monaĥoj. Posedante la legitimacion, en multaj monaĥejoj oni ricevas pli bonan aŭ pli malbonan manĝaĵon, kaj en pli multaj monaĥejoj — nenion.

La pia pilgrimanto, alveninte en Romo, unue akceptas la karton por la aŭdienco ĉe la "sankta patro". Li venis ĉi tien, por forsuĉi la ŝviton de la grasa mano de la papo. Tiu, kiu "pilgrimis" vagonare, senpage ricevas la "aŭdiencan karton" (ĉar ĉe la veturbiletaro estas kupono por tio); kiu venis piede, devas pagi kvin lirojn. Nur post almozpetado li eble ricevas tiun karton pli malmultekosta aŭ eĉ senpaga. Por kelkaj aliaj aferoj la piedpilgrimanto ankaŭ devas almozpeti. Dum tiuj, kiuj venis vagonare, ĉie ricevas malkariĝon, de ni oni ĉie postulis la plenan prezon. Tio, kaj kelkaj aliaj maljustaĵoj kaj trompaĵoj kaŭzis, ke granda parto de la malmultaj, kiuj "kredeme" pilgrimis, en Romo eksiĝis el la eklezio. Ili saĝiĝis! Al ĉiu "kredulo" mi rekomendas, piede pilgrimi Romon. La vicoj de la liberpensuloj pligrandiĝos!

En Romo estas intermiksita la plej malnova antikvaĵo kun la plej moderna teknikaĵo. Antikvajn ruinojn preterveturas aŭtomobiloj kaj tramoj. Je malnova urba pordego apenaŭ estas ekkoneblaj restoj de la iamaj enskriboj — apude staras en novaj literoj: "Vive Mussolini!" aŭ "Vive il Ré". Ŝajnis al mi, ke tio estis la traduko de la antikvaj enskriboj.

Oni ne fanfaronas, asertante, ke en Romo estas tiom da preĝejoj, kiom la jaro havas tagojn. Mi ne klopodis, nombri ilin; por tio mia tempo estis tro malmulta. Sole mi konstatis, ke preskaŭ je ĉiu stratangulo staras "domo de dio". — En aliaj urboj samloke troviĝas pli necesa konstruaĵo, pro ĝia neceseco nomata "necesejo". Sed necesejojn oni vane serĉas en la stratoj de Romo — tre nature, se la loko por tio jam estas okupita.

Tra la "sankta pordo" mi eniris la famkonatan katedralon "Sankta Petro". Tiel aroganta mi estis, ke mi tute ignoris la "sanktajn" pordflankojn kaj ŝtupojn. Aliaj homoj entuziasme kisas — eĉ la ŝtuparon. Sed multaj ankaŭ nur metas la manon sur la kisotaĵon kaj kisas la manon. — Mirante mi rigardis la pompan lukson de la "plej bela preĝejo de la mondo." Vera arto estis ĉi tie reprezentata. Belaj kaj bonaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj. En la mezo de la granda halo, sub la altega kupolo estas konstruata la tombo de la apostolo Petro. Jam oni trovis ie en Romo du ostarojn, de kiuj oni kredas, ke unu el ili estas de Petro kaj la alia de Paŭlo. En alia urbparto estas la katedralo de Sankta Paŭlo, en kiu estas "entombigita" la alia ostaro.

(Daŭrigota)

klamo por rusaj poŝtmarkoj! "*Weltjugendliga*", Berlin, 28. 11. 25. Raporto pri la mondjunularligo de 1924. "*Assurance Agents' Unio Chronicle*", London, 5. 12. 25. Esp. Lecionon. "*Esperanto*", Jerusalem. Kelkaj vortoj pri la esenco de Esp. "*Daily Herald*", 21. 11. 25. Kie Esp. plej vastiĝis inter la laboruloj (SAT 3398). "*Arbeiter-Zeitung*", Frankfurt a. M., 10. 11. 25. Esp. la lingvo oficiala de la laboristaro! (J. Roth). "*La Interligilo del P. T. T.*", Paris, 28 11. 25. Jubilea numero! "*Sundaj Worker*", London, nov. 25. "La lingvo de la laboruloj!" "*The Post*", London (n-roj 307, 308). Esp. lecionojn. "*Mitteilungsblatt der Int. Transportarbeiter-Föderation*, Amsterdam, dec. 25. Esp. rubriko. "*La SAT-Propagandisto*", Doolhof (n-ro 7), dec. 25. "*Svenska Arbetar Esperantisten*", Göteborg, dec. 25. Kunligo estas ebla? (SAT 1163). "*Munkáskultura*" (Laborista Kulturo), Budapest, septembro 25. Raporto pri la V. SAT-kongreso. "*Munkáskulturo*" (Budapest) dec. 1925, Raporto pri la Lab. Esp. Jarkunveno. La lab. Esp. movado suferegas sub la persekutato de la polico kaj distriktestroj! "*Naŝ Putj*" (Kremenĉug), 19. 12. 1925, Germana lab. deligataro kontinuas sian laboron! "*Eklumo*" (n-o 8), Letero de W. Bennewitz. Enhavas rēklamafiŝon por Senn. kaj S.-R. "*Sächsische Arb.-Zeitung* (Leipzig), 30. 12. 1225, Lenins Junker! Kom. Esp, Dienst. "*Assurance Agent's Union Chronicle*" (London), jan. 1926, Esp. lecionon!

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio

— K-do *Hermann Heller*, Schupstr. 25, *Antwerpen*, dez. koresp. pri ĉ. temoj, pref. kun fraŭlinoj. Printempe mi faros Mondvojaĝon k. event. vizitos ilin.

Germanio

"Kursanoj" dez. koresp. pri ĉ. temoj, L., PK., PM., PI. bfl. ĉiam resp. Adr.: *Alfred Scharf, Rudelstadt,* n-o 48, in Schles.

— K-do *Paul Thomas, Körnerstr. 30, Auerbach i. V.*, dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. k. vigla interŝanĝado de PI. bfl.

— K-dino *Trudi Schmalfuss*, Wettinstr. 2, *Auerbach i. V.* dez. koresp. k. ĉ. l. gek-doj, PI., bfl.

— K-do *Kurt Hähle*, Gartenstadtstr. 40, *Neukirchen i. Erzgeb.* dez. koresp. k. ĉ. l. L., PI., PI.

— K-do. *Helmut Otto*, Forststr. 67, c. *Neukirchen i. Erzgeb.* dez. koresp. k. ĉ. l. precipe kun radio-amatoroj k. naturamiko.

— K-do *Max Wetzel*, Gartenstadtstr. 39, b. *Neukirchen i. Erzgeb.* dez. koresp. k. ĉ. l. L., PK., PI.

— K-do *Kurt Zschuckelt*, Langestr. 14. *Riesa-Weida i. S.* dez. koresp. k. ĉ. l. gek-doj, precipe pri politik-ekonomiaj temoj. L., PK. Respondo garantiata,

— K-do *Herbert Holtzhauer*, Mariannenstr. 108, II. *Leipzig-Volkmarsdorf*, dez. koresp. pri politikaj k. teknikaj temoj. L., PK., PI. k. ĉ. l.

— K-do. *Alfred Krause*, Artilleriestr 4, IV., *Magdeburg*, dez. koresp. pri seriozaj temoj kun k-doj ĉiulandaj L., PI.

— K-do *Kurt Klotz*, Augustusstr. 93, *Meerane i. S.*, dez. interŝ. PI. k. ĉ. l.

— K-do *Max Wetzel*, tipografisto, Theaterstr. 23, *Glauchau i. S.*, dez. interŝ. pres-aĵojn, bildojn, esp-aĵojn k. ĉ. l.

Hispanio

— K-do *José Salom* (fraŭlo, manlaboristo) calle Weyler, 82, *Pla de Natesa* (Mallorca), dez. interrilati kun gekomunistoj ĉiulandaj, ĉefe el Sovetio, L., PI., nepre resp.

Aĉetu! **Aĉetu!**

Jean Tousseul

La Morto de Blanjo

tradukis L. Bergiers

2. volumo de Biblioteko de Sennaciulo

Serio: Literaturo

Prezo: 0,60 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1
Leipzig - Stötteritz

Sovet-Unio

— *Irkutsk, Universitato, grupo de esperantistoj.* Medicinistoj de la mondo, korespondu kun ni pri medicinaj novaĵoj. Respondo garantiata. Persone kaj aparte laŭ la sama adreso deziras korespondi pri vivo de studantoj *Lesnikov* kaj pri medicinaj temoj *Majzlis.*

— *Irkutsk, Gubfo, komĉelo de junuloj* dezirás korespondi pri laborist-movado kaj sociaj temoj kun tuta mondo. Persone laŭ la sama adreso deziras korespondi *Sadovnikov* kaj *Isaev.*

— *Irkutsk, Markstrato, 1a sovŝkola,* al gvidanto de esp. kursoj Babiĉev por dezirantaj korespondi pri ĉiuj temoj kursanoj.

— "Esperantista Rondeto" dez. koresp. pri ĉ. temoj L., PK., PI. Adr.: *Klub Peĉatnikov,* str. de R. Luksemburg, 31, *Odessa.*

— "Infanoj-esperantistaj" dez. koresp. k. ĉ. l. L., PK., PI. Adr.: *Trudŝkola,* 62, Vneśnaja, 74, *Odessa.*

— "Grupo de Esperantistoj" dez. koresp. pri ĉ. temoj, L., PK., PI. k. ĉ. l. Adr.: *Klub Jaŭvarstiĥ Mastestich,* Tovarnaja, *Odessa.*

— "Komitato de Profunuiĝo Sovetlaboranto" dez. koresp. kun samspecaj eksterl. organizaĵoj pri profesia movado. Skribu grandnombre por pruvi al ĉ. profunuiĝoj neesperantistaj, ke Esp. estas vera interligilo de prol. amasoj. Adr.: *Dolinskaja,* Ekaterinoslav. gub. *Mestkom Sovtorgsluĵ.*

— K-do *M. P. Sabo,* C. K. Svjazi, k. 206, Dvorec Truda, Solanka, 12, *Moskvo,* pri stato de lab.-movado en tuta mondo. Akurate resp.

— K-do *Eŭgeno Bukatin,* Dubovskaja, 2, *Stalingrad,* pri ĉ. temoj, k. ĉ. l.

— "Kom. junuloj k. infan-grupoj" dez. ekinterrilati kun samaj organizaĵoj de Mez-Azio, tuj skribu let. kun viaj informoj k. demandoj al SAT-peranto: *K. Koblov,* U. S. S. R. Uzbekistan, *Taŝkent,* poŝtkesto, n-o 6.

— Du lernantinoj dez. koresp. pri lernejaj temoj kun tutmonda gelernantaro. Respondo nepra. Adr.: *L. Kravcova,* Ul. Fr. Engels, 20, *Rostov-Don.*

— "Esp.-Kursoj" dez. koresp. kun k-doj ĉiulandaj pri div. temoj. Adr.: *Por Kursoj,* poŝtkesto, n-o 82, *Rostov-Don.*

— K-do *G. V. Naumov,* Nikolskij pereulok, 123/170, *Rostov-Don,* serĉas seriozajn korespondantojn pri lab. temoj. Resp. garantiata.

— K-do *Ivan Lidin,* Poĉta Knijnyj Kiosk, *Kazan,* interŝ. PI. (speciale kun Italio), esp-aĵojn, koresp. pri socialaj temoj.

— K-dino *Marija Valentinoviĉ,* B. Tatarskaja, 31, *Minsk,* pri ĉ. temoj, PK., PI. k. ĉ. l.

— "Kiu sendos al mi il. gaz.-ĵurnalojn kun subskribita traduko, tiu ricevos de mi la saman aŭ 'antikvan, sovetan pap. monon laŭ deziro. Ekstereŭropanoj ricevos duoble." Adr.: *J. Fedorov.* N.-Moskovskaja, 64, kv. 6, *Minsk.*

Averto!

Ĉiuj Esperanto-grupoj, SAT-anoj, Esperantistoj kaj aliaj organizaciaj laboristoj estas avertataj pro iu persono nome Willy Struck kiu ankaŭ vojaĝas sub la nomo Willy Bröer aŭ eĉ sub aliaj nomoj. Li estas proksimume 25jara kaj venas el la malliberejo. Li rakontas, ke li estis punata por politikaj aferoj, ke li estis sendita de la rusa registaro en la baltikaj taĉmentoj "von der Goltz" (1919) ktp. Li interrilatis kun nia grupo dum lia mallibereco. Post lia liberiĝo, li trovis provizoran hejmon helpe de l' esperantisto W. Heydorn en la kom. kolonio "Moorhof" apud Harburg. Tie li subite malaperis kunprenante, laŭ raporte, la monon, tolaĵojn, vestaĵojn, multevalorajn librojn, objektojn kaj laborilojn.

Kiu ion scias pri la nomita bonvolu sciigi al Proletarische Esperanto-Gruppe Hamburg-Altona
Adreso: Altona, Im Hag 5

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG